Justinus Kerner,

# Nun estu trinkata

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Nun estu trinkata brilanta la vin'!
Karuloj, mi devas forlasi nun vin.
Adiaŭ vi montoj kaj patra vi dom',
Pelata mi estas migrema mi hom'.

La suno ne restas sur lok' ĉe l' ĉiel',
Ĝi iras antaŭen laŭ sia korpel'.
La ondo ne restas soleca ĉe l' strand'.
La ŝtormo bruadas potence tra l' land'.

Kun hasta nubaro la bird' flugas jen
Kaj kantas enfore pri sia reven'.
Peliĝas nun same la hom-junular',
Por migri eksteren tra lando kaj mar'.

Salutas lin tie jen super la mar'
El lia hejmlando veninta birdar';
Odoras hejmece ĉirkaŭe de li,
Peliĝas aere eĉ ĝis tie ĉi.

La birdoj rekonas la domon de li,
La florojn li plantis pro am' tie ĉi.
La amo, ĝi sekvas lin ja ĉie ĉi,
Hejmeca fariĝas la foro por li.

Justinus Kerner,

# Wohl auf noch getrunken

Wohl auf noch getrunken den funkelnden Wein!
Ade nun, ihr Lieben, geschieden muß sein.
Ade nun ihr Berge, du väterlich Haus,
Es treibt in die Ferne mich mächtig hinaus.

Die Sonne, sie bleibet am Himmel nicht stehn:
Es treibt sie durch Länder und Meere zu gehn.
Die Woge nicht hastet am einsamen Strand,
die Stürme sie brausen mit Macht durch das Land.

Mit eilenden Wogen der Vogel dort zieht,
und singt in der Ferne ein heimatlich Lied.
So treibt es den Burschen durch Wald und durch Feld
zu gleichen der Mutter, der wandernden Welt.

Da grüßen ihn Vögel, bekannt überm Meer,
sie flogen von Fluren der Heimat hierher;
Da duften die Blumen vertraulich um ihn,
sie trieben vom Lande die Lüfte dahin.

Die Vögel, die kennen sein väterlich Haus.
Die Blumen einst pflanzt´ er der Liebe zum Strauß
Und Liebe die folgt ihm, sie geht ihm zur Hand:
so wird ihm zur Heimat das fernste Land.

*Traduko de la Germana poemo "Wohl auf noch getrunken " de* Justinus Kerner *(∗1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2014.*

*Arg-1030-2265 (2015-01-28 00:00:06)*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Justinus Kerner *(∗1786-09-18 – †1862-02-21), publikigita 1809.*

*Arg-1030-2089 (2015-01-27 23:51:52)*

*Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en* http://www.volksliederarchiv.de/text1950.html*. La kanto estas aŭdebla en* http://www.youtube.com/watch?v=nT5CaiMH3uU*. La muziknotoj troviĝas en* http://www.markomannenwiki.de/index.php?title=Wohlauf!_noch_getrunken*. Pri la verkinto vidu la vikipediejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Justinus_Kerner*.*